# ENHAVO

**MOZAIKOJ EN BIZANCIO**
Eugene de ZILAH . . . . . . . . . . . . . . . 3
**AL OAXACA**
**KUN ALEKSIS**
Peter BROWNE . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
**GRATULON AL**
**FRANS MAKKINK**
Ed BORSBOOM . . . . . . . . . . . . . . . . 8
**KONSIDEROJ PRI**
**ORIGINALOJ**
**KAJ TRADUKOJ**
Christian DECLERCK . . . . . . . . . . . . 9
**ESPERANTO KIEL**
**LINGVOLERNILO**
Teruhiro SASAKI . . . . . . . . . . . . . . 22
**OSIEK-PREMIO '2005'**
Kvin esperantistoj
plej ofte proponitaj . . . . . . . . . . . . 18
Aliaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . 19
**SUR INSULO DEZERTA…**
KIUJN TRI LIBROJN…?
Antonio VALÉN . . . . . . . . . . . . . . . 20
**KRUCVORTENIGMO 'KVE-119'**
MAGDA LENA . . . . . . . . . . . . . . . . 23
**LA RESPONDECA UZO DE LA**
**INTERNACIA LINGVO**
László J. TÓTH . . . . . . . . . . . . . . . 24
**KVINPETALE MANĜI**
Serge SIRE . . . . . . . . . . . . . . . . . . 25
**BUDHISME OBSERVI…MUŜON**
*Amiko el la junaĝo de Maigret*
de SIMENON, tra Daniel LUEZ
recenzo: JEAN-LUC TORTEL . . . . . . 26
**UNUA ROMANO**
**PER ESPERANTO**
*Sen Titolo* de ŜIRJAEV
legis: Roland PLATTEAU . . . . . . . . 27
**ATESTO KONTRAŬ**
**"HONORKRIMO"**
*Vivbruligita* de SUAD, tra R. BOUCHET
recenzo: SHI Chengtai. . . . . . . . . . 28
**LA FAJREGO**
MAO Zifu . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 29
**ĈU VI JAM SCIAS… ?** . . . . . . . . . 30
**ŜAKPROBLEMO 'ŜPB-119'**
Algis KASPIRAVICIUS . . . . . . . . . . . 30
**EL VIAJ LETEROJ…**
KRIS LONG . . . . . . . . . . . . . . . . . . 31

# FAVORATOJ POR OSIEK-PREMIO 2005:

André CHERPILLOD, Christian DECLERCK
Enrico DONDI, Albrecht KRONENBERGER
Spomenka ŜTIMEC

**numero 119** **5a de la 20a jaro** **15jun05**

*Karaj Amikoj,*

*En tiu ĉi numero Christian Declerck donacas al ni belan riĉan eseon pri literaturo: la originala kaj la traduka. Jen minejo de legindaĵoj.*

*Ni retrovas lin kelkajn paĝojn poste proponita por Osiek-premio 2005, pro "Tarokoj kaj epokoj"; unuan fojon li staras inter la favoratoj, same kiel Albrecht Kronenberger. Tiuj kvin favoratoj rikoltis kune 41 el la 76 validaj proponoj ricevitaj; la 35 aliaj privilegias 21 diversajn aŭtorojn. Jen dua minejo de legindaĵoj.*

*Ĉu Antonio Valén estas lingvisto, aŭ beletra kritikisto, aŭ vortaremulo? Malfacile 'etikedi' lin... kaj fakte tute ne gravas por lia definitiva vojaĝo al insulo dezerta kaj nia tria minejo de legindaĵoj.*

*Por nutri la estetikan senton kaj plezurigi la okulon via redaktoro pristudas bizanciajn mozaikojn. Krome, Peter Browne nutras nian vojaĝemon, Serge Sire, nian manĝemon. Fine ni dankas novan, entuziasman, kontribuanton, Teruhiro Sasaki, kaj ĉiujn kiuj recenze, artikole, letere aŭ ludpropone kreis tiun ĉi numeron, la lastan antaŭ la 'kvar-monata' somera paŭzo.*

*Madeleine de Zilah*